

INFORMOJ je la 8a de junio 2015

Nous avons reçu de :

- **FABRICE MORANDEAU : Kanzonosemajnfino ĉe Kvinpetalo en Bouresse (86) la 13an kaj 14an de junio**
« Gekaraj kunkantantoj. La venonta kanzonostaĝo proponita de La Kompanoj okazos la 13an kaj 14an de junio en Bouresse (86). Se vi jam partoprenis en kanzonostaĝo, vi jam konas la etoson kaj la enhavon de la repertuaro, kiun ni plu preparas por surstrataj kunkantadoj, interalie dum la UK en Lillo. Sur [la retejo de La Kompanoj troveblas nun](#) eĉ sonregistraĵoj el pasintaj staĝoj por helpi vin lerni la kanzonojn. Sed la partoprenontoj en tiu semajnfino en Kvinpetalo, kiel unuaj, ankaŭ malkovros la lumbildaron, kiu akompanos la spektaklon de la Lilla dimanĉa kongresa vespero "Brel inter la gigantoj", kaj Brel-kanzonojn interpretotajn de FaMo. Kvinpetalo amike akceptos nin. Tial ni petas, ke la partoprenontoj bonvolu tuj sendi alkröĉitan aliĝilon al Claude : [Claude Nourmont <moonmont@pt.lu>](mailto:moonmont@pt.lu). Ni bezonas vin por kunkanti surstrate kaj sursceneje... venu, venu !! Amuzikajn. Salutojn. Marcelo/FaMo nome de ĉiuj kunkantantoj. PS. Bonvolu plusendi tiun mesaĝon al de vi konataj interesatoj. ». *Voir document joint.*
- **PHILIPPE COUSSON : Ekumena kongreso**
« Saluton al ĉiuj. **Post la 1a de julio ne plu eblos aliĝi al la ekumena kongreso en Strasburgo** (tuj post la UK). Restas do al vi nur unu monato por aliĝi. **Aliĝilo troveblas sur la retpaĝo de KELI** (<http://keli.chez.com>). Kore. Philippe Cousson. »
- **ALEKS K. : Tournée de conférences de Zhang Fude du 29 mai au 13 août 2015**
« Saluton. Après les tournées de Aleksandre Melnikov et Firdaus et Svetlana Shukurov, **commence ce jour la 3e tournée de conférences en France, cette année 2015, celle de Zhang Fude (Chine)**. La tournée est, comme les autres, organisée par Yves Nicolas au nom d'Espéranto-France. **Cette tournée le mènera dans une quinzaine de villes en France, y compris Strasbourg (congrès œcuménique de KELI / IKUE début août) et Lille fin juillet, pour le 100e Congrès mondial Lille 2015 et jusqu'en Allemagne. Plus d'infos sur la tournée sur <http://esperanto-france.org/tournee-zhang-fude-2015>**. Bonvenon Fude kaj dankon Yves ! Kore. ALEks K. »
- **ESPERANTO HAMILTON : Celebri datrevenojn**
« Karaj Legantoj. **Tiu ĉi bulteno estas iom pli vasta, ĉar entenas la sensacian artikolon pri Esperanto en nazia koncentrejo**. En ĝi troviĝas tiom da nekonataj faktoj, ke ne eblis ilin priskribi nur unupaĝe. Ni publikigas tion, ĉar en majo oni celebras 70an datrevenon ekde kiam sur eŭropa kontinento finiĝis 2a mondmilito. Tio estis la plej granda kaj terura tragedio en tuta historio de la homaro kaj inter la jaroj 1939-1945 pli ol 70 milionoj da homoj pereis. **Antaŭ 100 jaroj, la 12an de majo 1915 naskiĝis frato Roger Schutz, fondinto de la Taizé-komunumo (orienta Francujo, proksime al Svislando) kie, ekde jardekoj, renkontiĝas amase junularo el multaj landoj. Vi povas legi pri tio ankaŭ en Esperanto, uzante la vikipedian retejon: <http://eo.wikipedia.org/wiki/Taizé>**. Por ni estas eble interesa la informo, ke al Taizé veturis ankaŭ junaj esperantistoj kiuj klopodis ke, inter la kelkdeko da lingvoj, ankaŭ Esperanto estu tie uzata. En nia Internacia Lingvo aperis eĉ la t.n. "Letero de Taizé" sed hodiaŭ oni plue uzas tie nur naciajn lingvojn. Homoj veturantaj al Taizé estas tre impresitaj per amikeca atmosfero, samkiel per bela muziko kaj kantoj en diversaj lingvoj. La interesitoj povas ĝin aŭdi uzante la popularan "youtube". Tia estas la "franca akcento" en nia kuranta numero, ĉar baldaŭ okazos la jubilea Universala E-kongreso en Lille (Francujo) – verŝajne tre sukcesa ĉar partoprenos ĝin multaj esperantistoj. Amikajn salutojn al ĉiuj – "NU". ». *Voir document joint.*
- **DIDIER LOISON : Dossier sur le langage**
« Saluton. **Ĉu vi vidis ke la 17an de aprilo aperis tuta dosiero de Science et Univers "Le langage : origine, nature, diversité..."? Aperas pozitiva informo pri Esperanto**. Koncerna paĝo legeblas ĉi tie: <http://www.esperanto-france.org/articles-publies-dans-la-presse-en-2015>. La tuta dosiero aĉeteblas ĉe la gazetvendistoj kontraŭ 12,50 €. Didier Loison. Vice président d'Espéranto-France . »

Gxis.

Renseignements complémentaires : 02 54 27 95 51 ou 06 78 90 92 17